

La Espero

Svenska Esperantotidningen

1973-2

Fondita en 1913

Lerneja kampanjo

Pasis jam multaj jaroj depost kiam ni dediĉis iom da laboro al informado pri esperanto inter la lerneja junularo. Tio daŭre okazadas nur en kelkaj lokoj, kie energiaj esperantistoj penas atingi iom da sukceso.


Por plibonigi la situacion la estraro de SEF decidis entrepreni iom pli vastan informan kampanjon al lernejoj kaj iliaj instruistoj. La celo de la kampanjo estas informi, ne instrui. Gravas ja, ke la lernejoj sciu pri la ekzisto de esperanto. Nur se ili scias pri ĝi, ili povas veni al la ideo lerni ĝin. Por la momento estas do plej grave informi al ili.

Ni tute certe ne sukcesos atingi ĉiujn lernejojn kaj ĉiujn lernejojn de Svedio. Se ni devas elekti, estas plej logike elekti lernejojn kaj lernejojn en tiuj lokoj, kie ekzistas esperantistoj — ĉefe en lokoj kie ekzistas esperantistoj, kiuj pretas kunlabori en tiu ĉi kampanjo.

La kampanjo estas direktata "de supre", sed ĝi ne povas sukcesi sen la kunlaboro de esperantistoj en diversaj lokoj.

Kion oni planas ?

Ni pretigas nun iom da informmaterialo uzebla en lernejoj. Je la komenco de la kampanjo estos preta broŝuro, kiu direktos sin rekte al lernejoj. Ĝi prezentos la lingvan problemon kaj esperanton el alloga kaj simpla maniero. Preta estos ankaŭ afiŝo kiun oni povos pendigi sur la informtabulojn de la lernejoj, kelkaj prelegoj por tiuj kiuj volos kulabori en la informado en la lernejoj, eventuale ankaŭ portebla ekspozicio pri esperanto.



Kiel funkcios la kampanjo ?

Ni unue decidis, al kiuj lernejoj ni direktu nin (tie ĉi via kunlaboro estos bezonata!). Kiam ni havos la informmaterialon preta (broŝuron, afiŝon, alion) ni sendos ĝin kun letero al la rektoroj, la ĉefinstruistoj pri lingvoj kaj al la estraro de la lernantaro. En la letero ni informos ilin pri la celo de la kampanjo, sed ankaŭ pri la adreso de la loka esperantoklubo kaj la adresoj de la esperantistoj, kiuj pretas fari prelegon al la lernejoj.

Vi mem aŭ via loka klubo ricevos la samajn informilojn kaj informojn. Ek de tiam via kunlaboro estos plej grava.

Vi povus ekzemple telefoni al la lernejo kaj proponi, ke vi parolu al kelkaj klasoj pri esperanto dum la matena kolektigo (vi ricevos pretan prelegon por via uzo). Vi povus kontroli ĉe la rektoro aŭ la lernantaro, ĉu oni uzis la afiŝon. Vi povus proponi, ke oni vicigu esperanton inter la temoj elekteblaj por "fritt valt arbete" — kompreneble se ekzistas iu en via loko, kiu povus gvidi tian lernejan grupon.

Se vi faros prelegon en iu lernejo vi ricevos por distribuo la kvanton de broŝuroj kiujn vi bezonos. Se vi hazarde sukcesos starigi kurson, vi ricevos la helpon, kiun vi bezonos.

Kiu faru cion ĉi ?

La kampanjo okazas kiel kunlaboro inter SEF, SEJU kaj SIEF. Kiel mi jam menciis, ni pretigos la informmaterialon centre kaj turnos nin al la lernejoj ankaŭ centre. Ni do prenos la unuan paŝon. La lokan agadon ni ne povas plani. Plej bone estas, se vi fondas en via loko malgrandan neformalan grupon, kiu planu la lokan agadon kaj dividu la laboron, por ke ne nur unu ricevu la tutan ŝarĝon.

La kvanto de laboro dependas de via iniciatemo kaj energio. En plej multaj kazoj vi bezonos nur telefoni al iu lernejo kaj eventuale fari prelegon en ĝi. Se vi kapablas fari la saman en pluraj lernejoj, des pli bone.

Ni bezonas **tuj kaj urĝe** kontakton kun membroj kiuj pretas kunlabori. **Ĉu vi pretas dediĉi kelkajn horojn al tiu ĉi laboro ?**

Sendu vian nomon kaj adreson al SEF, Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm.

Bonan kunlaboron!

Franko Luin

Redaktoro:

"Se vi jam faris tiel radikan ŝanĝon, kial vi ne faris la revuon unulingva pure esperanta?"

"En numero 1/1973 Franko Luin skribis pri diskriminacio. Ni esperantistoj ne diskriminaci la komencantojn!"

Jen du voĉoj pri La Espero, ambaŭ de respektindaj aktivuloj kaj kunlaborantoj. Verdire, la du samideanoj ne parolas pri tute la sama afero, ĉar la dua ne rekte pledas por la sveda lingvo sed por pli facila teksto por komencantoj, kaj tiun deziron ni provos en ia maniero kontentigi.

Tamen la du opiniesprimoj ambaŭ montras al la stranga fakto, ke ni esperantistoj en nia agado havas lingvan problemon. Oni povas eble eĉ diri, ke troviĝas en nia movado du "skoloj".

Laŭ la anoj de unu skolo ni esperantistoj pledas por lingvo, relative facile lernebla kaj uzebla. Pri tiu lernebleco kaj uzebleco ni devas konvinki la eksteran mondon. Tion ni ne povas fari, se ni mem ne uzas nian lingvon: se niaj revuoj estas ĉefe svedlingvaj kaj se ni parolas la nacian lingvon je niaj kunvenoj. Tiuj anoj same opinias, ke la komencantoj ne havas utilon de nia movado, se ni uzas la nacian lingvon: ili devas lerni ne nur en kursoj sed praktikante la lingvon en kunvenoj kaj per legado.

La alia skolo opinias, ke ni devas ligi la homojn al ni, ilin interesigante por la vivo en niaj kluboj kaj en nia movado entute, tielmontrante la eblecojn de esperanto. Ni ne devas fortimigi la komencantojn nek per troa uzo de nia lingvo, nek per tro malfacila, tro virtuoza uzo de esperanto en gazetoj kaj en interparolo. Krome ni devas pripensi, kelkaj diras, ke multaj homoj pro duobla laboro aŭ aliaj cirkonstancoj fakte ne havas sufiĉan tempon por lerni esperanton, sed ili tamen havas intereson por ĝi.

Kiam temas pri La Espero aperas svedlingve ĉefe informaj tekstoj, pri kongresoj kaj similaj aranĝoj. Ni konsentas, ke la problemo estas granda kaj ni provas "bilanci" inter la du kontraŭaj opinioj. Verŝajne ni devas daŭrigi tiel, ĉar ambaŭ "skoloj" pravas ĝis certa grado. Ni tamen ne forgesu, ke nacia esperantogazeto ne estas internacia, ke ĝi devas unuavice servi al la landa movado.

Sven Sjöblom

Cu ni agas celkonscie?

Antaŭ kelka tempo mi demandis en librovendejo pri certaj esperantolibroj. Oni bedaŭris, ke oni ne havas sed promesis havigi ilin post kelkaj tagoj. Kiam mi revenis post preskaŭ du semajnoj oni deklaris, ke la klopodoj estis vanaj, ĉar neniu eldonejo havas tiujn librojn. Mi demandis: Cu vi provis ĉe Eldona Societo Esperanto en Malmö? Ne, tiun eldonejon oni ne konas, ne havas ĝian katalogon.

Alian tagon mi demandis ĉe la loka biblioteko pri Kiel akvo de rivero de Raymond Schwartz. Oni ne havis sed promesis havigi, notis titolon, verkiston, mian nomon kaj telefonan numeron. Tri tagojn poste oni telefonis el la urba biblioteko en Linköping, demandis multe pri la dezirata libro kaj vere montris grandan intereson. Nun pasis ses semajnoj sed verŝajne oni ne sukcesis trovi la libron.

Nun mi demandas: Cu estas strange, ke nia lingvo estas malmulte konata, kiam nia literaturo ne estas trovebla en la librovendejoj kaj eĉ grandaj urbaj bibliotekoj ne sukcesas havigi verkojn, kiuj devus esti sufiĉe konataj?

Parenteze mi povas malkaŝi, ke mi tute ne bezonas la menciitajn librojn, ĉar mi jam legis ilin. Mi demandis nur por sperti kio okazos.

Rezulte de miaj spertoj mi volas proponi, ke nia Eldona Societo havigos sufiĉan nombron de la katalogo de la Libroservo de UEA kaj distribuos ĝin al kiel eble multaj urbaj bibliotekoj kaj librovendejoj en nia lando kune kun sia propra librolisto.

Tiu afero kompreneble kostos iom da mono, sed estas necese, kaj mi supozas ne maleble, ke la kluboj kontribuos per aparte kolektitaj monsumoj, ĉar estas en nia propra intereso.

Runo Stridell

RESPONDO

Ĝis nun ni ne spertis ke la librovendejoj havis malfacilaĵojn trovi nin. Kutime ni ricevis la mendojn pere de ilia centra distribua organizo. Sed post la ĉeso de la komisia sistemo de la svedaj librovendistoj antaŭ jaro, evidente fariĝis pli malfacile por librovendejoj en malgrandaj lokoj trovi la adreson. Ni tial intencas elsendi libroliston al ĉiuj librovendejoj en nia lando. Tamen restos la problemo ke la vendejoj nuntempe kutimas aldoni ĝis kvindek procentoj al la prezo de eksterlanda libro.

La bibliotekoj estas tute alia problemo. Se ili ne havas la petitan lib-

KALMAR ATENTIGAS:

Ĉiuj kiuj veturos per la ŝtataj Fervojoj al la SEF-kongreso dum pentekosto 1973 ricevos rabaton je 25% de la biletkostoj.

Glumarkoj kongresaj kostas 1: — kronon po folio de dek markoj. Haveblaj de

Esperanto-Kongreso,
J. Wik,
Jupitervägen 8,
381 00 Kalmar

Poŝtĝirokonto 86 00 73-6.

Ni lernu per eraroj!

La latinan esprimon "pro et contra" ni traduku Esperanten: por kaj kontraŭ. Do: niaj malamikoj parolas kontraŭ ekzistebla de la Internacia lingvo, sed ni kuraĝe pledu kaj laboru por la enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn. (POR MONTRAS ANTAŬEN, EKZ. AL CELO).

Ni ne vivas por manĝi, sed manĝas por vivi. (Aŭ: por ke ni vivu) (ne porke).

Pro doloroj en mia stomako mi ne povis manĝi, sed devis fasti.

Pro okupiteco mi ne povis vin viziti hieraŭ. (PRO MONTRAS MALANTAŬEN, EKZ = AL KAŬZO).

Oni ne "partoprenas al" la kongreso, sed "partoprenas kongreson" aŭ "partoprenas en" la kongreso.

Movi k. ravi estas transitivaj. Do: ne movu vin! (Malkorekte; ne movigu vin!)

Same: min ravis la bela pejzaĝo. (Malĝuste: min ravigis la b.p.)

T. M.

ron, ili ne aĉetas ĝin sed turnas sin al specialbiblioteko aŭ al alia, pli granda, biblioteko, por prunti ĝin. Tial la plej bona solvo estus se, kiel estas aranĝita en multaj landoj, unu sveda biblioteko estus specialisto pri Esperantoliteraturo kaj aĉetus ĉiujn haveblajn Esperantolibrojn.

Eldona Societo Esperanto
Sven Sjöblom

Skandinaviska kongressresan 1973

Den 58:e internationella esperanto kongressen äger som bekant rum i Belgrad i år, förlagd till veckan 28 juli—4 augusti. Det finns naturligtvis olika möjligheter att ta sig till Belgrad, men för dem som föredrar en gruppresa — och en bekväm och tidsbesparande resa — ordnas även i år en gemensam skandinavisk flygresor med de från tidigare kongressresor så populära Gustav och Bodil Kühlmann, Köpenhamn, som reseledare.

Härnedan programmet i sammandrag:

Fredagen den 27 juli avresa från Köpenhamn med SAS till Belgrad.

28 juli—4 augusti: Världskongressen i Belgrad med alla intressanta upplevelser som den för med sig.

Därefter kan man välja mellan två olika alternativ för veckan 5—12 aug., antingen

SPLIT, en underbar vecka vid Adriatiska havets kust, bad och sol.

ATEN, i den grekiska huvudstaden ordnas en officiell efterkongress med visning av de oskattbara historiska minnesmärkena. Säkert en upplevelse.

Både till Split och Aten går färden med flyg från Belgrad söndagen den 5 augusti, och söndagen den 12 flyger man tillbaka till Köpenhamn direkt från Aten och från Split via Zagreb.

Priset är detsamma för båda alternativen, 1.395 sv. kr., och det inkluderar flygresorna och hotellkostnader med frukost (i Split halvpension).

Skriv till Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö, för ytterligare upplysningar. Betr. anmälan till kongressen i Belgrad se särskild artikel.

BREVMÄRKE BELGRAD

Hjälp till att göra reklam för världskongressen i Belgrad genom att på all post sätta kongressens brevmärke. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1: 40
3 kartor kr. 3: —

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).



Atene — la Perdo de Hadriano.

(Bildo: Heroldo)

Anmälan till kongressen

I förra numret av La Espero lämnade vi utförliga uppgifter om anmälan till esperantovärldskongressen i Belgrad veckan 28 juli—4 augusti 1973. Vi upprepar här de väsentligaste informationerna:

Anmälningsblanketter beställes hos fru Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040/652 09), och till samma adress återsändes anmälningsblanketten.

Avgifter:

1. Icke medlem i UEA: 163 kr.
2. Medlem i UEA med årsbok: 141 kr.
3. Medlem i UEA med årsbok och tidsskriften Esperanto: 118 kr.

Kongressdeltagare som deltar med make eller maka betalar för denne i kategori 1 115 kr., kat. 2 96 kr. och kat. 3 också 96 kr. Ungdomsmedlem (20 år och yngre), 50 kr, universitetsstudierande (30 år och yngre) 82 kr. och blind 66 kr.

Anmälan före den 20 juni, men om du vill undvika onödiga friktioner bör du givetvis anmäla dig snarast möjligt.

CDL

Centra Dana Esperantista Ligo okazigos sian jarkongreson la 12-an kaj 13-an de majo en Århus, kie samtempe (12-a—18-a de majo) okazos la jubilea kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. La kongresanoj de CDEL partoprenos sabate kaj dimanĉe en la programo de IFEF, inter alie en Interkona Vespero, ekuмена diservo, Solena Malfermo, urba rondveturado kaj Kongresa Balo.

Informojn donos la loka kongreskomitato pere de

Povl Jørgensen
Tordenskjoldsgade 2
DK-8200 Århus N.

SAT

La 46-a Kongreso de S.A.T. (Senacieca Asocio Tutmonda) okazos en Toronto, Kanadio, 30.7—6.8 1973. Oni planas flugvojaĝon el Parizo. Informojn donas la SAT-peranto por Svedujo, Ivar Paulsson, Algtan 3, 3 tr., 171 33 Solna.

Kalmar 9-10-11 juni

Under pingsthelgen, 9—11 juni, väntar vi oss en välbesökt årskongress i Kalmar. Anmälningssblanketten, ett postgiroinbetalningskort, bifogades förra numret av La Espero. Fler blanketter kan rekvideras från Esperanto-kongressen, J. Wik, Jupitervägen 8, 381 00 Kalmar, eller från SEF, Jungfrugatan 30, 114 40 Stockholm. (Skr. Ulla Luin har telefon 08/712 82 91).

Vi upprepar priserna: dubbelrum, 40 kr. per person och natt, enkelrum 55, frukost 6: 50, diné på pingstafton 30 kr., lunch pingstdagen 20 kr., thesupé pingstdagen 10 kr., utfärd anandagen (buss) 27 kr. Om du vill vara med på allt detta behöver du inte beställa varje måltid etc. för sig, du beställer ett kongresspaket i vilket ingår logi 2 nätter, utflykten och alla måltider som nämnts ovan (2 frukostar). Pris 180 kr. per person i dubbelrum och 210 i enkelrum. Kongressavgift: 25 kr. (SEJU 10.)

Sista anmälningsdag 18 maj, där efter garanteras icke hotellrum (eller rabatt på järnvägen). Men vänta inte till sista dagen, sänd anmälan i dag!

Gästföreläsare är i år Helmuth Sonnabend, vice ordförande i esperantolärarnas internationella organisation, ILEI. Han skall tala om de stort upplagda experiment med undervisning i esperanto i skolan som pågår i södra och mellersta Europa. Se programmet — pingstdagens eftermiddag. Dessa experiment är kanske den viktigaste aktiviteten i esperantovärlden just nu, men inte så väl kända.

Efteråt blir det diskussion om vad vi i Sverige kan göra i vår planerade kampanj med information om esperanto i skolor. Ett tillfälle att få veta om klubbar på andra orter har samma problem som ni själva!

Mat, logi och sammanträden på Stadshotellet som ligger vid Stortorget, mitt i centrum.

Bilparkering på torget mitt för hotellet.

200 meter till bussterminal där alla stadens linjer utgår.

200 meter till hamnen med utsikt över hela längden av Ölandsbron.

200 meter till promenadvägar på de mer än 300-åriga vallarna runt centrum.

Busslinje 4 till det nya 65 meter höga vattentornet med utsiktsterrass och servering. Hissavgift 1: — kr. och busspris enkel resa 1: — kr.



PENTEKOSTAN SABATON 9/6

- 15.00 Malfermo de la kongresa akceptejo.
- 16.00 Kunsido de estraroj de SEF kaj SEJU.
- 17.00 Fakaj kunsidoj.
- 18.00 Solena malfermo de la kongreso.
 - a) Kantado "La Espero".
 - b) Salutparolo de la prez. de LJK.
 - c) Muziko.
 - d) Elekto de kongresaj funkciuloj.
- 19.00 FESTA BANKEDO.
 - a) Salutparolo de urba reprezentanto.
 - b) Salutoj de en- kaj eksterlandaj ĉeestantoj.
 - c) Kanto kaj muziko de la Svängsta-grupo.
 - d) Filmo pri Kalmar.
 - e) Dancado.

PENTEKOSTAN DIMANĈON 10/6

- 9.00 Jarkunsido de SEF.
- 12.00 Komuna lunĉo.
- 13.30 Jarkunsido de Eldona Societo Esperanto.
- 14.30 Prelego de lernejestro Helmut Sonnabend pri "Kial kaj kiel lingva eksperimento — la nuna stato en Eŭropo". Grupdiskutado.
- 16.30 Rondvojaĝo en la urbo per aŭtobusoj.
- 19.00 Komuna supeo.
- 20.00 Distra vespero.
 - a) Kanto kaj muziko de la Svängsta-grupo.
 - b) Solkanto de Hans Lindén, ĉe la piano Roland Dupuis.
 - c) Roland Dupuis: Rondvojaĝo en Francio (lumbildoj, kanto, pianludo).
 - d) Komuna kantado. Gvidas la Svängsta-grupo.
 - e) Junulara duonhoro.
 - f) Eventualaj plujaj programpunktoj.

PENTEKOSTAN LUNDON 11/6

- 8.30 La aŭtobusoj startos por kvarhora rondvojaĝo en Öland.
- 12.00 Komuna lunĉo en restoracio "SKANSEN", Färjestaden.
- 13.30 Ĝis Revido! Fermo de la kongreso.
- 14.00 La aŭtobusoj reiras al Kalmar, por atingi la trajnojn en bona tempo.

LJK

Tessins mästerverk den 300-åriga katedralen (domkyrkan) vid Stortorget. Öppen alla dagar.

Slottet med museum. Öppet alla dagar. Busslinje 2.

Har Du möjlighet att stanna några dagar efter pingsthelgen för att i lugn och ro "titta på stan" så kommer du absolut inte att ångra det.

LJK

1972 Resume

1973 ŝajnas fariĝi la jaro de la rompo de la rutinaĵoj. La Espero ŝanĝis aspekton kaj samtempe kelkaj rutinaĵoj malaperis el ĝi. Alia rutinaĵo kiu mankas en tiu ĉi numero estas la jarraporto de SEF. La estraro decidis pliampleksigi ĝin kaj pro tio ne plu publikigi ĝin en la gazeto. Anstataŭe aperas ĉi-sube mallonga resumo de la jarraporto. La pliampleksigita jarraporto aperos aparte kaj ĝin ricevos aŭtomate ĉiuj kluboj, la delegitoj al la ĵarkongreso en Kalmar kaj la partoprenantoj al ĝi. Krome ricevos ĝin ĉiuj, kiuj petos ĝin ĉe la sekretario de SEF.

Se oni tralegas la jarraporton, oni ne trovas ion eksterordinaran en ĝi. 1972 estis jaro de normala agado en la kluboj kaj la federacio. La nombro de la membroj estas daŭre la sama, la nombro de la kluboj ankaŭ. Fondiĝis dum la jaro du novaj kluboj (en Charlottenberg kaj Jönköping), sed du kluboj kunfandiĝis (Svängsta kaj Olofström), dum tiu de Norrahammar eniris en la novan klubon de Jönköping.

Kelkaj novaĵoj

La sekretariato de SEF sendis regule informojn al la kluboj sub nova nomo kaj formo. KlubbInfo. Ĝi aperis kvinfoje. Al ĉiu numero de KlubbInfo estis aldonitaj eltondaĵoj de plej gravaj gazetartikoloj pritraktantaj esperanton aŭ lingvajn problemojn ĝenerale.

La celo de KlubbInfo estas doni organizaĵajn informojn kiuj speciale interesas la diversajn funkciulojn de la movado.

Okazis du novaj ekspozicioj, krom kelkaj kutimaj: en Norrköping ekspozicio en la urba biblioteko vekis grandan intereson ĉe la loka gazetaro. SEF havis ekspozicion ĉe "Mediforum" en Stockholm en junio dum la UN-konferenco pri la homa medio.

Daŭrigo de la agado

La informa agado sekvis cetere la normalan vojon. Esperanto-nytt aperis per kvar bonaj numeroj en po 4 000 ekzempleroj kaj ĝin daŭre ricevis i. a. ĉiuj parlamentanoj.

Ni aktive partoprenis dum la jaro en la laboro de la UN-asocio, kie la federacio estas membro.

La ĉiujara kongreso ricevis pli laboran karakteron. Ib Schleicher prelegis pri "Efika informado" kaj lia prelego pozitive influis nian postan laboron.

La Instituto denove aranĝis prelegsemajnon en Frostavallen, kiu, laŭ kutimo, estis bonkvalita kaj bonsukcesa.

Kelkaj gravaj decidoj

Notindaj estas precipe kelkaj gravaj decidoj, kiuj donos rezulton nur en 1973 aŭ pli poste. Dum la jaro estis ellaborita nova broŝuro ("Ĉu oni bezonas pli da lingvoj, kiam oni jam havas tri mil?"), kiu dumtempe jam aperis. Estis decidita eldono de nova lernolibro ("Ek!"), kiu aperos en la aŭtuno ĉijare. Estis ankaŭ farita decido pri informa kampanjo al lernejoj kaj oni nun planas ĝin.

Se oni povas mallonge karakterizi la jaron 1972 oni povus nomi ĝin la jaro de interna plifortiĝo. Estas rimarkebla nova energio en la organizo, mezurebla per fondo de novaj kluboj (nur du en 1972, sed jam du en 1973 — en Ljungby kaj en Skellefteå) kaj starto de pluraj novaj agadoj.

La Suda distrikto pri la Espero

La Suda distrikto de la Sveda Esperanto-Federacio decidis, dum la ĵarkunveno en Trelleborg 11/3 1973, rekomendi al la redaktoro de La Espero:

1. Denove konsenti pri paĝo por komencantoj.
2. Permesi notojn kaj raportetojn de kluboj kaj distriktoj.
3. Aranĝi kolonon por demandoj kaj diskutoj.
4. Prizorgi ke oni utiligu la kolonan spacon pli bone ol en la unua numero 1973. (En paĝo 8 oni estus povinta ŝpari 80 kolonmilimetrojn, ekz.)
5. Fari la gazeton kiel eble plej intima kaj iomete pli amuzakcentita. (Anekdotoj k. t. p.)

Suda distrikto de SEF

Lisbet Andreasson, sekr.

Respondas la redaktoro:

1. Ni estas pretaj dediĉi certan parton de la gazeto al la komencantoj (verŝajne ne tutan paĝon) sed ni bedaŭrinde ne havas tempon mem redakti ĝin. Bonvolu esplori pri konvena persono kiu tute memstare redaktu tiun parton! Tiu persono estu kapabla mem respondi por la lingva kvalito de la teksto.
2. Ĉiuj raportoj kiujn sendis al la redakcio kluboj kaj distriktoj dum mia redaktora tempo aperis. Oni ne sendis ĝis nun (18/3) iun raporton pri la ĵarkunveno de la Suda distrikto!
3. Ne sufiĉas nur rubriko, oni devas sendi al ni kontribuojn. Ni aperigos

ĉion kondiĉe ke 1) oni skribu koncize, 2) la temoj iel rilatu al nia movado, 3) oni ne faru personajn atakojn kontraŭ iu persono. Ni priprenos kiel ankoraŭ instigi.

4. Tio estas afero de la teknika redaktoro (por numero 1/1973 funkciis Franko Luin). Estas kompreneble ankaŭ afero pri la aspekto de la gazeto: tro kunpremita teksto farus pli pezan impreson. La nova formo de La Espero entute fakte permesas pli da teksto ol la malnova.
5. Estas demando pri spaco (= ekonomio), gusto, kaj akirebla materialo. Ni ja publikigis ŝercajn anekdotojn kelkfoje dum la lastaj jaroj.

Ni dankas la Sudan distrikton por la proponoj, ni priprenos kion ni ankoraŭ povos fari kaj volonte aŭdos, kion opinias aliaj legantoj pri la supre proponitaj aferoj.

Ake Blomberg

ÅRSMÖTE

Härmed kallas andelsägarna i

FÖRLAGSFÖRENINGEN
ESPERANTO u. p. a.

till ordinarie årsmöte

söndagen den 10 juni 1973

kl. 13.30

på Stadshotellet i Kalmar.

Ombud för andelsägande föreningar skall inlämna fullmakt före årsmötets början.

Ärenden enligt stadgarna § 14.

Styrelsen

Svenska Esperanto-institutet

som bl. a. har till uppgift att anordna högre och lägre examen har valt en ny direktör:

Doc. Ebbe Vilborg (examensledare), Prästgårdsängens 23, 412 71 Göteborg, tel. 031/40 52 74.

Folkskollärare Oskar Svantesson (för lägre examen), Skonertgatan 1, 421 74 V. Frölunda, tel. 031/29 03 81, 0340/513 29.

Märta Andreasson (sekr. och kassör), Lilla Tolsered, 420 11 Hisings Kärra, tel. 031/67 01 33.

Gunnar Jyborg, Kungälvsgatan 1 D, 416 69 Göteborg, tel. 031/15 49 92.

Letero al iama esperantisto

En la 30-aj jaroj vi lernis esperanton, kune kun aro da aliaj laboristaj junuloj. Tiam vi kredis je ĝi kiel kredis je ĝi miloj da aliaj. Sed la tempoj ŝanĝiĝis. Hitler aperis sur la germana horizonto kaj malpermesis esperanton en Germanio. Stalin pli poste helpis al malpermeso de esperanto en aliaj landoj.

Via interesiĝo pri esperanto ne estis tro forta. Vi turnis vin al la angla — eble ĉar la angloj kaj usonanoj estis kontraŭuloj de Hitler. Mi komprenas vin. Multaj aliaj faris simile kiel vi. La registaro ankaŭ oficiale akceptis la anglan kiel ĉefan fremdan lingvon de Svedio, kiam la germanoj perdis la militon. La lingvo de demokratio oni nomis ĝin en la jaroj post la milito.

Mi neniam aŭdis vin paroli la anglan. Laŭdire vi bone regas ĝin. Oni laŭdis vin pro ĝi dum la medikonferenco de UN, kiun vi prezidis. Ekspresen nomas vin "språkunnig man" pro via anglalingva kono.

Se oni speciale atentigas pri tiuj kvalitoj, ŝajne ne estas tiel kutime ke oni konas lingvojn. Plue, kaj ne nur halbute. Sed vi kiel junulo lernis esperanton kaj tio eble plifaciligis al vi la lernadon de la angla. Aŭ de la franca, kiun vi nun, laŭ Expressen, ekzercas.

Vi iam estis esperantisto, sed vi ne plu kredas je unu internacia lingvo. Vi diris al Expressen, ke oni hodiaŭ devas akcepti kvin mondlingvojn: anglan, francan, ĉinan, rusan, hispanan.

Vi ne estas la sola, kiu diras tion. Certe samopiniaj kun vi angloj kaj usonanoj, francoj, ĉinoj, rusoj kaj ĉiuj, kiuj parolas la hispanan. Ankaŭ samopiniaj kun vi diplomatoj, kiuj ne povas imagi al si alian lingvan solvon.

Tamen eble ne ĉiuj angloj kaj ne ĉiuj francoj opinias same. Kelkaj el ili eble opinias, ke nur angla aŭ nur franca kiel mondlingvo estus pli bona solvo.

Mi kredas, ke ili pravas. Mi kredas je unu internacia lingvo. Sed vi diris al Expressen, ke vi ne kredas je nur unu lingvo. Vi kredas je kvin.

Sed kial ĝuste je kvin? Kaj kial ĝuste je tiuj kvin?

La franca estas certe granda lingvo, sed la araba, la hindia kaj la bengala lingvoj estas pli grandaj ol la franca. Kial ili ne estu inter la kvin "mondlingvoj"? Ĉu eble ĉar vi ne konas ilin? Aŭ eble ĉar tiuj lingvoj estas "nekulturaj"? Ĝuste francoj ŝatas opinii ke la franca lingvo estas la kul-

tura lingvo. Mi esperas, ke vi ne havas tiajn antaŭjuĝojn pri lingvoj. Ĉar kaj la araba, kaj la hindia kaj la bengala havas malnovajn kaj riĉajn kulturojn, je kiuj ili povas referenci.

Ĉu eble tiuj lingvoj ne taŭgas, ĉar ili ne estas sufiĉe disvastigitaj? La araba certe estas disvastigita tra la tuta nordo de Afriko kaj partoj de Azio. Kaj ĉu la rusa kaj la ĉina estas pli disvastigitaj ol la hindia kaj la bengala? Apenaŭ.

Kio estas do la kaŭzoj, kiuj igas vin kredi ke ĝuste la angla, franca, ĉina, rusa kaj hispana estas la plej taŭgaj "mondlingvoj"? Eble ĉar ili estas lingvoj de la plej potencaj ŝtatoj de la mondo? La ŝtatoj kiuj decidis en UN, kiuj havas "veto"-rajton en la Sekurec-Konsilio, kiuj decidis pri la ekonomio kaj politiko de la mondo?

Britio, Usono, Francio, Ĉinio, Sovetunio. Kvin landoj, kvar lingvoj. Devas esti eraro, ke oni havas la hispanan inter la kvin, ĉu ne? Ĉu eble iu "aĉetis" la voĉojn de la sudamerikaj ŝtatoj en UN per alekto de la hispana, kiam iliaj voĉoj estis bezonataj? Tio povus esti ebla klarigo.

Vi verŝajne konscias, kiajn avantaĝojn jam havas la menciitaj kvin landoj. Kian ekonomian kaj politikan forton ili havas kompare kun la aliaj landoj. Ne nur evolulandoj, sed ankaŭ industriigitaj landoj, kia Svedio estas. Se vi ne konscias, ili certe faras. British Council, la brita ŝtata organizo por disvastigo de la anglaj lingvoj kaj kulturo skribas tiel ĉi en sia jar-raporto por 1968—69:

"There is a hidden sales element in every English teacher, book, magazine, film-strip and television programme sent overseas."

Kaj la sama British Council ankaŭ demandas sin:

"If we then gain political, commercial and cultural advantage from the world-wide use of English, what are we doing to maintain this position?"

Sian plej eblon, komprenoble. Vi rimarkis, ke mi ne tradukis la citaĵojn. Mi fidis, ke vi komprenas ilin.

Britio, Usono, Francio, Ĉinio, Sovetunio gajnas politikajn, komercajn kaj kulturajn avantaĝojn je la internacia uzo de siaj lingvoj. Oni povas diri tion, ĉu ne?

Sed je kies kosto?

Je la kosto de la malgrandaj, de la malriĉaj. Oni devigas la malgrandajn kaj malriĉajn landojn en Afriko akcepti iun el la eŭropaj lingvoj kiel sian edukon lingvon — pro la fakto ke iam eŭropa ŝtato estis tie por "kulturigi" ilin. Kiel koloniojn. Komprenoble ne ekzistas racia kaŭzo kial Gano estu "angla" kaj la najbara Eburbordo "franca". Neniu alia kaŭzo ol tiu ke eŭropaj landoj tiel decidis, kiam ili sistempe okupis la afrikajn landojn.

La sola kaŭzo kial la kvin lingvoj, kiujn vi proponis, estus taŭgaj kiel "mondlingvoj" estas, ke la landoj en kiuj la lingvoj estas parolataj, tion mem volas. Kaj ili volas tion pro la avantaĝoj, kiujn ili ricevas de tio. Je

kosto de la malgrandaj kaj la malriĉaj.

Vi estas socialdemokrato. Ĉu vi povas akcepti, ke la plej forta havu eĉ pli da avantaĝoj ol li jam havas, je la kosto de la malgranda kaj la malriĉa? Ŝajnas ke vi faras, ĉar vi proponas ĝuste pliajn avantaĝojn por li.

Mi tion ne povas akcepti. Pro tio mi kredas je esperanto kaj laboras por ĝi.

Iam vi lernis esperanton. Vi lernis ĝin, ĉar ĝi estis facila kaj ĉar ĝi igis vin, ano de malgranda popolo, senti vin egalrajta kun anoj de aliaj popoloj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj. Se tio validis tiam, tio validas des pli nun. La malegaleco inter la popoloj ne malkreskis. Tute kontraŭe. La plej potencaj popoloj sukcesis havigi al si pli da avantaĝoj — politikaj, komercaj kaj kulturaj.

Estas tempo labori kontraŭ tiuj avantaĝoj. Por ia egaleco ankaŭ inter la popoloj. Kaj tia egaleco estas nepensebla sen esperanto, ĉu ne, Inge-mund Bengtsson?

Franko Luin

Nova lernolibro preparata

Ĉi-aŭtune aperos nova lernolibro pri esperanto. Ĝi ricevos la nomon "Ek!".

"Ek!" estas sveda versio de la konata kurso "Esperanto programita" de Hermann Behrmann. Ĝi baziĝas sur modernaj metodoj de lingvoinstruado. La kurso estas "meminstrua", tio signifas, ke ĝi celas ĉefe al memstudado. Oni lernas komence per tre malgrandaj paŝoj kaj la ekzercoj estas tre facilaj. La lernanto povas tuj korekti sin mem. Iom post iom la ekzercoj fariĝas pli malfacilaj, sed tio okazas preskaŭ nerimarkeble. Tio faciligas la lernadon de vortoj kaj gramatiko, ĉar oni renkontas la samajn erojn multajn fojojn. Kaj tio signifas, ke parto de la teda kaj malfacila laboro de lernado estas faciligita.

Li libro estos pli ol 170-paĝa kaj preskaŭ kvadrata (formato 210×195 mm).

Vi certe komprenas, ke la presado de la libro koston iom. Ni volonte ricevus iom da helpo de vi por eldoni la libron. Se vi intencas aĉeti la novan lernolibron — ĉu por vi mem ĉu por konatuloj, kiuj intencas lerni esperanton, mendu ekzempleron jam nun. Vi ricevos la libron je favora prezo kaj helpos samtempe al ni. Se vi mendas antaŭ la 30-a de junio kaj pagas tuj,

vi ricevos la libron por 20 kronoj. La libro aperos nur en la aŭtuno, do vi devos atendi ĝis tiam, antaŭ ol vi ricevos vian ekzempleron. La lernolibro estos aĉetebla ankaŭ en la librovendejoj, sed tie ĝi estos pli multekosta.

Se vi samtempe ŝatus fari donacon, por ke ni povu eldoni la lernolibron en pli da ekzempleroj, ni estos tre dankemaj. Sendu la monon al la poŝtĝir-konto 66 41 50-0, Svenska Esperanto-förbundet, Informationskonto.

Ie en tiu ĉi numero de La Espero vi trovos anoncon pri "Ek!". Eltondu ĝin kaj mendu la novan lernolibron. Ek!

Ĉu minaco al esperanto?

En 1972 eldoniĝis nova lernolibro pri interlingua. Ĝi aperis ĉe ordinara eldonejo kiel materialo por pliaj studoj en la lerneja fako "ĝenerala lingvoscienco", kaj tiamaniere ĝi ankaŭ estas havebla en la librovendejoj.

En la sama jaro aperis 2—3 gazet-artikoloj pri interlingua en la sveda gazetararo. Laŭ nekontrolita informo, la interlingua-istoj ankaŭ aperigis tradukon de la sveda libro "Antaŭposte" en Interlingua.

Multaj esperantistoj vidas tiun ĉi aktivecon kiel minacon, parte tre prave. En tiu ĉi jarcento ja naskiĝis pluraj planlingvoj, kiuj havas la saman celon, saman idearon kaj similan strukturon kiel esperanto. Ĝis certa grado, tiuj lingvoprojektoj fariĝis konataj ankaŭ ekster la kadro de esperantistoj kaj anoj de la lingvoprojektoj mem. Kaj tiu aro de lingvoprojektoj certe donis tre konfuzigan impreson al aliaj homoj, certe ankaŭ ridindigis la tutan ideon de komuna planlingvo por la mondo.

Alia minaco al esperanto estas la nostalgio de la esperantistoj mem: ni rigardas al la 30-aj jaroj, kaj komparas kun la nuna situacio en Svedio, kaj vidas ke la esperantistaro ne estas pli granda nun ol tiam. El tio ni tiras la konkludon ke okazas nenio pri esperanto en Svedio, ke la laboro stagnas kaj ke ni ne povas atingi ion tie ĉi.

La minaco ne estas tiu pesimismo mem, sed la minaco estas ke se la esperantistoj ne faras ion, tiam aliaj faros tion kion la esperantistoj devus esti farintaj. Per aliaj vortoj: Se ne la esperantistoj informas pri sia ekzisto en librovendejoj, en lernejoj, en bibliotekoj, en gazetoj, tiam Interlingua aŭ aliaj lingvoprojektoj kaptos tiujn homojn kiuj mem iom pensis pri

Radio-jubileo

Radio Zagreb

ondolongo: 264,7 m

Ĉiujaŭde, 5 minutojn post noktomezo laŭ MET.

Kun plezuro ni publikigas la ĉi-apudan artikoleon de s-ino Lapenna. Inter la esperantlingvaj radiodisaŭdiĝoj tiuj de Radio Zagreb sendube apartenas al la plej bonkvalitaj. En la daŭro de tiuj pasintaj 20 jaroj oni donis amason da informoj pri Jugoslavio, la lando, la popolo, la kulturo, la esperantomovado — ankaŭ la inter-

nacia. Aŭskulti ilin — ili estas ĉe ni relative facile aŭdeblaj. Jen s-ino Lapenna:

Fakte, ne la radio-stacio jubileas, sed Esperantlingvaj elsendoj de Radio-Zagreb celebras sian 20-jaran ekziston, la sola elsendo por esperantistoj en Jugoslavio aktivanta konstante 2 jardekojn (komenciĝo en 1953). Bedaŭrinde, kvankam radio estas multe pli internacia amas-komunikilo ol televido, Esperantlingvaj elsendoj estas relative malmultaj, sed ankaŭ intereso kaj subteno de esperantistoj, unuopuloj kaj la preso, ne abundas. En Svedlando Esperantlingva programo de Radio-Zagreb havas kelkajn konstantajn aŭskultantojn al kiuj la redakta komitato esprimas dankon pro la kompreno por tiu aktivado.

Skribi unu poŝtkarton, eĉ se nur unufoje jare, estas kuraĝigo por redakta komitato de tiuj elsendoj. Se vi tion volas kompreni, oferu du minutojn de via tempo kaj skribu al Radio-Zagreb, Esperanto-fako, 41-ZAGREB, Jugoslavio. El profundnokta trankvilo, per radio-ondoj venos al vi dankesprimio.

Emilija Lapenna



Elsendon de Radio-Zagreb efektivas harmonia kunlaboro de du generacioj: gvidantino Emilija Lapenna kaj du junaj parolistoj Darinka Antoniĉ kaj Nikolo Matijeviĉ, studentoj.

la problemoj de lingvo kaj lingvodiverseco.

La avantaĝo de la esperantistoj estas ke ni havas ion por montri, kion aliaj planlingvanoj ne havas. Eĉ se ni rigardas nur Svedion, ni povas montri daŭran libroeldonadon en tri eldonejoj, plurajn funkciajn revuojn, 3—4 ĉiujarajn renkontiĝojn tutlandajn, kaj regulajn klubkunvenojn en aro da kluboj tra la lando kun variaj, ofte bonkvalitaj programeroj.

Por ne paroli pri la cetera mondo! Tio kio mankas al ni estas bona in-

formado inter ni mem, kaj bona informado al neesperantistoj.

La informado dependas de la membroj, kaj nur tiuj membroj povas bone informi, kiuj estas mem bone informitaj.

Ni bezonas krei al ni mem pli optimisman, pli modernan rigardon al esperanto. La informoj, kiuj povas doni tiun bildon, ekzistas. La laboro kolekti, vortumi kaj distribui la informojn estas granda laboro — ni faru ĝin kune!

Ulla Luin

Kien, homo?

Komenciĝis en la malgranda sudjapana fiŝista kaj industria vilaĝo Minamata. Iun tagon en la jaro 1956 la katoj tie frenezis. Ili subite eksaltis kiel ĉasataj de furioj tra la stratetoj ĝis la maro, saltis en la akvon kaj dronis. Tiam neniu el la enloĝantoj ankoraŭ imagis, ke tiuj enigmaj sinmortigoj de la katoj estis la unuaj signoj de katastrofo por ili kaj por la vilaĝo. Sed kelkajn semajnojn pli poste pluraj fiŝistoj de Minamata estis atakataj de mistera malsano. Ili komencis forte tremi, bojis kiel hundoj, batis ĉirkaŭ si kaj fine kolapsis je kramfaj konvulsioj. Oni transportis ilin en la malsanulejon de la loka kemifabrikaĵo Chisso.

Dum la ĉefkuracisto, d-ro Hosokawa, serĉadis la kaŭzon de la simptomoj malsaniĝis ankoraŭ 279 personoj, kaj el ili 57 mortis. Nur ses jarojn poste, en 1962, la ĉefkuracisto trovis la solvon: hidrarga veneniĝo. La hidrargo fluas kun la kloakakvo el la Chisso-fabrikaĵo en la maron. Veneniĝis unue la fiŝoj, poste la katoj kaj la homoj kiuj manĝis tiujn fiŝojn. La kemifabrikaĵo daŭrigis la produktadon. La hidrargo daŭre fluas en la maron.

La dua katastrofo okazis iom pli poste en la provinco Tojama. Ĉe iu d-ro Hagino subite aperis pacientoj, kiuj plendis pri fortaj doloroj en la abdomeno, en la ostoj kaj en la artikoloj. Neniu rimedo helpis. La ostoj de la pacientoj ŝrumpis, fariĝis facile frakaseblaj kaj splitiĝis pro kiu ajn nesingarda moviĝo. La rentgenbildoj pri unu sola malsanulo montris ne malpli ol 72 ostarompiĝoj. Doktoro Hagino donis al la doloriga malsano tre karakterizan nomon: "Itai = Itai" (= aj!-aj!). La nombro de la pacientoj kreskis ĝis 280 kiam la kuracisto fine trovis, ke la malsanon kaŭzas la metalo kadmio. Tiu metalo troviĝis en la kloakakvo, kiun la metalkompanio "Mitsui" elfluigis en la riveron Lintu. La akvon de tiu rivero la terkulturistoj laŭlonge de la bordoj sensuspekto uzis por akvumi siajn rizkampojn.

Mortis je nepriskribeblaj suferoj 119 homoj. La kompanio "Mitsui" sin turnis al sciencistoj, kiuj pruvis, ke la teorioj de doktoro Hagino pri kadmio-veneniĝo estis eraraj. Kaj la kadmio daŭre fluas kun la kloakakvo en la riveron.

La tria katastrofo okazis en okcidenta Japanujo. Subite mortis 500 000 kokinoj pro furagveneniĝo. Post kelkaj monatoj malsaniĝis pli ol mil homoj. Ili suferis de ekzemoj, spiraj ĝe-

noj, harardefalo, memorperdo, senapetiteco kaj artikdoloroj. Gravedaj virinoj, kiuj ekhavis tiun malsanon, naskis malhelhaŭtajn bebojn. Oni nomas ilin "nigraj beboj". Oni trovis, ke tiun malsanon kaŭzis la kemiaĵo Polychlorobiphenyl aŭ PCB. La firma Kanemi Soko uzis tiun kemiaĵon je la fabrikado de certa furago, kaj pro teknika difekto venis tro da veneno en la furagon. La kokinoj manĝis la venenitan furagon, kaj la homoj manĝis iliajn ovojn kaj la viandon, do!

En la sekvintaj jaroj okazis pluraj aliaj katastrofoj en diversaj partoj de Japanujo. Ekzemple la "Yokkaichistmo" trafis unue la enloĝantojn de la havenurbo Yokkaichi. Pro tiu suferiga tussmalsano mortis 58 homoj. La malsanon kaŭzis sulfurodioksido per kiu granda petrokemia industrio venenis la aeron. Oni konstatis ke la fabrikoj elligis pli ol 384 000 da kilogramoj da sulfurodioksido po tago.

Tiuj katastrofoj vekis iom da atento, sed la homoj — escepte de tiuj kiuj rekte suferis — ne tre interesiĝis. Kaj la venenado de aero, akvo kaj grundo daŭris. Ĝis la ĉefurbo Tokio mem estis trafita.

La 18-an de julio 1970 iaspeca melka nebulavolo pendis super la japana metropolo. Regis brula varmego, neniu vento sentiĝis. En la korto de iu lernejo kelkaj knabinoj manpilkudis. Subite unu infano kolapsis, plendante pri kapdoloro kaj vomemo. Ŝiaj okuloj brulis. La gamboj ne plu portis ŝin. Ambulanco transportis ŝin en la malsanulejon.

En tiu sama tago ĉirkaŭ 6 000 homoj sin anoncis ĉe kuracistoj kaj ambulancstacioj en Tokio, ĉiuj kun la samaj simptomoj. Ili estis la unuaj viktimoj de tute nova fenomeno: "fotokemia nebulo". Pro la ultravioleta sunbrilo gasoj de fabrikoj kaj aŭtoj sin kunmiksas kaj formas tre danĝeran tavolon da venengasoj. Deklaris d-ro Kaino, direktoro de la Tokia Instituto por Esplorado pri la Defendado de la Medio: "En tia situacio la enloĝantoj de Tokio devas uzi gasmaskojn!"

Tokio estas la nervocentro de Japanujo. 11,5 milionoj da homoj loĝas tie, tie situas 83 000 fabrikoj, grandaj bankpalacoj, domogoj de asekuraj kompanioj, la grandaj tagjurnaloj, televidaj stacioj, universitatoj kun 500 000 studentoj. Tie koncentriĝas la politika kaj komerca potencoj de la 110-miliona popolo. Ĝi decidas ankaŭ pri la psikologia klimato de la lando.

Tiun klimaton ŝanĝis fundamente la venengasŝoko de la 18-a de julio 1970. Ĝis tiam la plej multaj homoj estis nur fieraj pro la grandega industria progreso de la lando post la dua mondmilito. Nun ili konstatis, ke tiu progreso donis al la lando ne nur ekonomian prosperon kaj politikan potencon; kun ĝi sekvis ankaŭ grandega detruado de la naturo, de la japana insularo mem. La mallarĝa bordostrio de Tokio ĝis Osaka estas longa 600 kilometroj. Sed tie loĝas 62 milionoj da homoj. 56 % de la japana popolo sur 1,5 % de la tuta teritorio de la lando. Sur tiun malgrandan landstrion kaj

en la aeron super ĝi estas elverŝataj grandegaj amasoj da malpuraĵoj. La sciencistoj trovis, ke en ĉiu monato falas 34 mil kilogramoj da industria malpuraĵo sur ĉiun kvadratkilometron de la urbo Tokio. La aŭtoŝofito daŭre malpurigas la aeron; en 1955 troviĝis en Japanujo 1,5 milionoj da aŭtomobiloj, en 1972 jam 21 milionoj. La fiŝoj en la Golfo de Tokio estas forte venenitaj per tiu PCB, kiu krom la supre menciitaj simptomoj ankaŭ — laŭ kuracistoj — povas kaŭzi kanceron.

La enloĝantoj de Tokio estis ŝokitaj pro la situacio, kaj ŝokita estis la tuta popolo. Nun komenciĝis vere serioze la diskutadoj pri Gelfo de Tokio defendi la medion, la registaro decidis pri esplorado kaj proponis agojn. En Eŭropo kaj Usono oni pli frue atentis pri la danĝero, kaj oni havis certajn sukcesojn. En New York falas po monato "nur" 17 mil kilogramoj da malpuraĵo sur ĉiun kvadratkilometron, en Gelsenkirchen en okcidenta Germanujo "nur" 10, en Stockholm verŝajne eĉ pli malmulte. Sed ĉu ni vere haltigi la evoluon?

Espereble ĉiu leganto komprenos, ke la celo de tiu ĉi artikolo ne estas klaĉi pri Japanujo kaj speciale montri ĝiajn malbonajn flankojn. Japanujo estas grava esperanto centro, kaj ni scias, ke ĝi estas ĉarma lando kun ĉarma popolo. Al tiu lando kaj popolo ni povas deziri nur feliĉan estontecon. Sed kia estos ilia estonteco? Ĉu ili havas ankoraŭ tempon por savi tion, kion ili jam detruis? Kia estos nia estonteco? Ĉu ni sukcesos majstri la grandegajn problemojn de malpurigo kaj veneniĝo de niaj maroj, nia aero, nia grundo?

Aŭ — ĉu la teknika kaj materia civilizo de la industria aĝo, kiu naskiĝis en Eŭropo, disvastiĝis al Usono kaj atingis la entrepreneman japanan popolon fine detruos sin mem — kaj la homaron? Ĉu ni povas esti certaj, ke ni havas ankoraŭ estontecon?

(Resume el "Der Stern")

Belgrad: Alternativo

Norvega Esperantista Ligo aranĝos aŭtobusvojaĝon al la 58-a UK en Beograd. Ekiro 21.7, reveno 12.8.

ŝipo Oslo—(Göteborg)—Kiel, eblas aliĝi ankaŭ en Hamburgo. Loĝado dumvoje en du-litaj ĉambroj, plena pensio, en Beograd hotelo kun matenmanĝo. Proksimuma prezo: 1.800 norv. kronoj.

Informojn: Turista Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo sentrum, Norvegujo.

Norda Prismo reaperis

Post unujara intermito — kaŭzita de malsanigo de la redakcia sekretario — reaperis nia tradicia Norda Prismo kun postdataj numeroj 1/1/72 kaj 2/1972. Ni ĝoje re-bonvenigas la multifacetan priskon, t. e. la kvaron-jaran revuon kun kultura, socia kaj literatura speguloj sub la daŭra redaktado de **William Auld**, kies konata nomo garantias plua prezento de altkvalitaj, buntaj bukedoj selekte plektitaj el la freŝe floranta literaturo Esperanta.

Akceptu kun amo (kaj re-abono!) ĉi trezoron komunan, kies riĉenhavaj specimenoj 1/72 k. 2/72 vigle vivas kaj verve vibras en nia animo, vekante soifan sopiron al 3/72 k. 4/72.

La n-ro 1 montras sunan bildon pri la fondaj-fontaj figuroj de Geedzoj Szilágyi, kiuj dum dekdu jaroj briligis Nordan Priskon, sed kiuj, ho ve tiom frue forpasis al la fora-ombra mondo. Sed ilia spirito inspire reaperas en la verkaro de la lertmanaj kunlaborantoj de l'unua grupo: Nogueira, Kock, Ragnarsson, Régulo, Boulton, Watkins, Wells kaj ceteraj, por citi nur kelkajn el la kunverkintoj.

La duan parton enkondukas Hilda Dresen pri du literaturaj jubileoj elstaraj: Miloš Lukaš kaj Lajos Tárkony.

Ni ne povas ne mencii (eĉ citi) Poul Møller, kies majstra peniko pompe pentras "Danan Printempon:

FEBRUARO

*Tre mallaŭte la printempo venas...
Rivereton, lagon frosto ĉenas,
kaj malsate pepas la birdaro;
estas ja ankoraŭ februaro.
Neĝtavolo ĉie teron fermas,
tamen sub tapiŝo blanka ĝermas.
Galantetoj la unuaj estas,
kiuj pri venonta mild' atestas.
Vipas krude norda frosta vento,
tamen tag' post tag' sur firmamento
pli kaj pli la vintra sun' leviĝis:
bela periodo jam longiĝis.*

MARTO

*Pli rapide la printempo venas:
en batalo nun la suno penas
venki froston, neĝon kaj glacieron,
vekis jam tulipon kaj lilion,
kaj ŝveligis sur arbei' burĝonojn,
vokis de l'birdaro gajajn tonojn.
Sentas la miraklon homo, besto;
ĉiujara, bela manifestoj!
Venkis suno post penplena starto,
vekis suno dum ankoraŭ marto,
kaj inspire blua anemono
brilas kiel eta amazono.*

El la dua grupo elstaras du hungaroj: lingvistodo de **Benczik**, kaj originala simbolo sprita de **Szathmáry**: Muŝoj.

La Libro-Kulturan ĉapitron regas kritika komentario de **Clive Watkins** pri tria hungaro kaj superstelo de la tutmonda Esp-a horizonto literaturo, **KALMAN KALOCSAY**, kiu per sia plia interpreto de la **Shakespear-a**: "T e m p e s t o" starigis novan literaturan monumenton eterne daŭran, eble lastan kreaĵon grandiozan de parenca spirito Sekspira (K. K. ja estas pli ol 80-jara).

Eugenia Morariu, kiu en nro 1 de Norda Prismo donacis al ni novelon "Fefelega" de pia pastro **Agárbeceanu** pentranta lokan eposon de la rumana kamparo kaj vekanta kompaton pri mizera sorto malriĉula, en nro 2 N.P. prezentas al ni, en verda vesto, ruĝ-flav-blujajn "Florojn de la tero" plantitajn en la rumana viv-ĝardeno de "la Gorki de Balkano" (mi prefere dirus Karpata-Danuba Bazeno) **Zaharia Stancu**.

Aĉetu (aŭ prefere abonu ĉe Esp. Eldonejo, Malmö) ĉi du kajorojn literaturajn kaj feliĉigu vin mem per ilia legado dum du monatoj (aŭ jarkvarojn).

T. M.

Rejuniga legolibro

Julio Baghy: Printempo en la aŭtuno. Rakonto pri lonĉe melankolia renkonto. Noveldono de "Dansk Esp.-Forlag 1972. 14 × 19. Broŝurita. 116 p. Kun kovrila desegno. Prezo ĉe Esperantoförlaget, Malmö. Sv. kr. 15: 60.

Ĉi rave reva romaneto aperis origine en 1931 Köln, eld. de "Heroldo de Esperanto". Ĝi elĉerpiĝis delonge. Tial ni danke salutas kaj bonvenigas la noveldonon de s-ro Friis. La hungara poeto-princo prenis sian temon el la teatra mondo, kiun li konis profunde. Jam liaj gepatroj estis teatristoj. Kaj Baghy mem aktoro. En poemaro "Preter la Vivo" (1931) li prikantas (en Siberia milit-kaptitejo):

Drama aktoro estis mia patro
sortorompita, kara maljunul'
kiu ludante rolojn en teatro,
larmojn elvokis ĉiam el okul'...

Drama aktoro estis mia patro...
Mi, obeema lia fila id',
por mi elektis rolojn en teatro
viŝi ĉi larmojn por — tutkora rid'.

- Kvaropo ludas la ĉefrolojn en ĉi tiu tragikomedio. Du komediantoj — arlekeno kaj aŭguristo — kiuj dum sia viv-aŭtuno klopodas forigi fortajn obstaklojn de sur la Sorta Areno. Kaj du gejunuloj. Adamo kaj Eva en kies animo subite ekfloras la burĝono de l'Unua Amo, kiun baldaŭ frostigas Vivo-prujno... La tuta historio daŭras nur du tagojn. Sed la memoro de tiuj feliĉaj tagoj rebrilas dum ilia tuta vivo, kvazaŭ konstante brilanta la stel', klare penetras tra sorta malhel'.

La recenzinto ne plu malkaŝos delikatajn detalojn de flu-stila, facile legebla libro, por ne ĝeni vian propran guon. Mi dankas eldonistan amikon Friis. Ĉi verketo resorĉis min el bombkrea Nunco en palan, pactempan Paŝinton. Kiam 17-jara studento igis ciganan violoniston ludi sub fenestro de hungara Margareto, kiu danke ekbruligis kandelon en sia fenestro pro mildsona melodio... Pri la tempo de Printempo, en la koro — eĉ en foro — brilos oro. La memoro ja mem oro. Jen la recenzinto igis poeto. Rejunigis. Saman sukceson rikoltu la legantoj de "Printempo en Aŭtuno"!

T. M.

Mia karulino

*Bebica ĉarma,
por vi mi flamas
Vin mi amas.*

*Bebica dolĉa,
la trezoro
en mia koro.*

*Bebica fidela,
mia fianĉino
baldaŭ edzino.*

Unuo ni

*Kisas mi
tenere, pasie
mamojn Viajn.*

*Respondas Vi
kareseme mole.*

*Sipo estas ni
sur la maro
de la Amo.*

Jim Hornö

Afrika gasto

UNUSEMAJNA PRELEGSERIO — 1 433 aŭskultantoj en 13 prelegoj Afrika gastprelegisto en okcident-sveda regiono

Oni bone povas eluzi nur unu semajnon, se venas al la lando lerta prelegisto, kiu majstre regas sian temon. Tio okazis en la lastaj tagoj de februaro kaj unuaj de marto, kiam s-ro Justin Minani vizitis Gotenburgon kaj faris en la urbo kaj proksima regiono entute 13 prelegojn pri "Burundio — la lando kie genocido (etnia ekster-

profesoroj kaj studentoj formis tre atentan aŭskultantaron, kiam s-ro Minani prelegis pri la muziko de Burundio laŭ aparta invito de la muzikscienca fakultato.

Cie la aŭskultantoj esprimis sian simpatian al la prelegisto pro eksterordinare bona prelego; rektoroj, geinstruistoj kaj gelernantoj senrezerve admiris la fluan kaj perfektan uzeblecon de Esperanto kiel interlingvo. Komprenoble la postprelega horeto de demandoj kaj respondoj forte impresis, kiam la publiko senĝene povis demandi kaj dank' al bona kunlaboro inter preleganto kaj interpretanto tuj ricevis respondojn.

La aranĝanta INTER-grupo dankas pro la kunlaboro kun la prelegseria komisiito de la dana asocio CDEL, s-ro Rich. Fiirgaard, kiu proponis s-ron Minani por unusemajna prelegado en regiono de Gotenburgo. Poste sekvis kunlaborado surloke kun Okcident-sveda Societo por UN.

S-ro Minani, kiu finis fundamentajn studojn kvarjarajn en la universitato de Lyon, nun intencas resti en Francio por pretigi sian doktoran di-



Rektoro Schmidt, Axvall, s-ro Aberg, s-ro Manani.

mado) okazas kiam la monda konscienco dormas". La preleganto rakontis pri sia afrika hejmlando, pri la suferoj de sia gento, pri familiaj tragedioj en la terura murdado, kiu depost majo 1972 signifis kruelan morton de 500 000 homoj kaj rifuĝon al najbaraj landoj de proksimume 200 000.

S-ro Minani estis invitita de Okcident-sveda Societo por UN (Unuigintaj Nacioj), kiu komisiis la organizaĵon kaj gvidadon de la koncentrita prelegserio al Inter-grupo en Gotenburgo. Dekdu el la prelegoj okazis en diversspecaj lernejoj, kvin en gimnazioj, kvin en popolaj altlernejoj, unu en studrondo de Esperanto kaj unu en universitato de Gotenburgo. Krome okazis unu prelego antaŭ esperantista publiko de Esperanto-Alianco de Gotenburgo.

Kvar ĵurnaloj de Gotenburgo faris intervjuojn, kiujn interpretis Iva kaj Lennart Aberg. Ili ankaŭ interpretis en la svedan la publikajn prelegojn, Iva Aberg i. a. en la universitato, kie

sertacion. Bedaŭrinde finiĝis lia stipendio kvarjara, kiun afable peris la ambasadoro de Francio en Bujumbura, Burundio. Nun ne plu estas eble ricevi novajn stipendiojn, nek eblas trovi laboron en Francio por burundiano. S-ro Minani serĉas kelkmonatan laboron — de kiu ajn speco — por tiel ŝpari iom da mono. Ĉu iu povus helpi dum la periodo julio—novembro tiun ĉi jaron?

Ĝojiga estas la simpatio, kiun montiris societo de gelernantoj en Popola Altlernejo de Axvall. Ili disponas pri fonduso por afrika studento kaj nun provos disponigi la nunan kapitalon de la fonduso, 1 500 skr. Dank' al bona kunlaboro flanke de membroj de Klubo Esperantista de Skövde la studentoj en Axvall povas teni kontakton kun s-ro Minani por ankaŭ estonte "adopti" lin kiel sian afrikan kolegon kaj ekonomie apogi lin ankaŭ poste, laŭeble.

Jen kelke da pruvoj pri kunlaboro! Jen invito al daŭra kunlaboro!

Rivermonto

Gratulon!

NOVA GENERACIO

S-rino Dorica Morariu-Stenbäck en Jönköping naskis la 10.2. 1973 fratineton al sia filino. Do la feliĉa Tiberio Morfariu nun iĝis duobla avo.

Niajn korajn gratulojn!

JUBILEO DE KUNLABORANTINO

Nia diligenta literatura kunlaboranto, fraŭlino **Eugenia Morariu**, Cluj, Rumanio (lerninta Esperanton de Andreo Cseh antaŭ 50 jaroj) iĝis 70-jara fine de monato Marto 1973.

Niajn sincerajn bondezirojn!

NOVA REDAKTORO

Nia literatura redaktoro, Tiberio Morariu, estas elektita redaktoro por Svedlando de la altnivela literatura revuo Norda Prismo, kies ĉefredaktoro estas William Auld. Kiel vi verŝajne scias tiun revuon fondis Ferenc Szilagy, kaj ni gratulas al Norda Prismo ke ili sukcesis akiri tian kompetentan lingviston kaj literaturiston, kia sendube estas Morariu, kiel kunlaboranto por Svedujo. T. M. restos kiel literatura redaktoro por La Espero. Kontribuojn por Norda Prismo sendu al s-ro T. Morariu, Götaforsvägen 1, 124 30 Bandhagen.

LA GUTO — La Esperantoklubo de Ljungby fondita

Kiam la kvar gazetoj en la Kronoberga gubernio rakontis ke esperantoklubo estiĝis en Ljungby, certe multaj legantoj vidis la vorton esperanto unuafoje. Kronoberg ne posedas eminentan pozicion en la esperantomondo.

Estis la meblisto Herbert Lindros — esperantodelegito de multaj jaroj — kiu iniciatis la klubon kaj kunvo-kis interesulojn por konstitucia kunveno en la IOGT-domo Ljunggården la 5an de februaro. Dek kvin personoj observis la alvokon kaj decidis fondi la esperantoklubon La Guto. Du studrodoj laboras dum la nuna studjaro: kaj rondo por komencantoj gvidata de Ruby Toller, kaj rondo por daŭrigantoj gvidata de Herbert Lindros.

La estraro konsistas el: Herbert Lindros (prezidanto), Malte Markheden (vicprezidanto), Lennart Svensson (sekretario), Nejden Samuelsson (vicsekretario) kaj Karl Holmström (kasisto).

Lennart Svensson

Veteranoj forpasis

G. H. JOHANSSON, Mora,

fervojisto, mortis en decembro 1972, 81-jara. Li lernis esperanton en kursoj kiujn gvidis T. Morariu en Mora antaŭ 40 jaroj kaj dum la aktivaj jaroj li gvidis studrondojn en Dalekarlio, i. a. en Vika.

Redaktoro **Gustavo Henriksson**, Helsingborgo, mortis 69-jara la 13.1 1973. Dum 33 jaroj li deĵoris kiel korrektisto ĉe "Helsingborgs Dagblad". Li eluzis ĉiun okazon: kiam E-prelegisto aŭ kursgvidanto trapasis Helsingborgon, aŭ kiam diversnaciaj kursanoj de Elsinoro vizitis la paralelan-parencan svedan metropolon, por verki favorajn artikolojn en H. D. pri la Internacia lingvo.

KARL JOSEF MOBERG

En la momento de la finpretigo de tiu ĉi numero atingas nin la malĝojiga informo, ke mortis komence de marto konstruteknika inĝeniero Karl Josef Moberg. Li naskiĝis la 4/9 1893.

Li estis konata vaste ekster la stokholmaj rondoj. Antaŭ kelkaj jaroj li kompilis konstruteknikan fakvortaron esperantan kaj ankoraŭ antaŭ nur kelkaj monatoj li kontribuis al artikolo pri teknika vorto en La Espero. Li ankaŭ sendis al ni amuzajn anekdotojn por gajigi la legantojn.

Unesko informas

LA REVIZIO DE LERNOLIBROJ

La aŭtoro Stefan Zweig, parolante pri la kaŭzoj de malbonigo de internacia interkompreno per naciaj antaŭjuĝoj, diris: "Ĉion oni decidis ĝuste, kiam al la nova generacio de junaj eŭropanoj oni instruos la ĝustajn aferojn samtempe en ĉiuj landoj."

Tio estis en 1932. Tamen, antaŭ kelkaj monatoj, kiam televida intervjuo grupo el Munkeno pridemandis grupojn de lernantoj de polaj kaj okcidentgermanaj lernejoj pri iliaj opinioj unu pri la aliaj, oni trovis, ke multaj el la malnovaj ŝablonaj miskonceptoj restas, kaj ke ĉi tiuj, tre ofte, havas originon en la lernejoj, en la uzataj lernolibroj plenaj de misinformoj kaj antaŭjuĝoj. Oni nun klopodas ŝanĝi tiujn antaŭjuĝojn en reciprokajn komprenon. Komisiono de 60 okcidentgermanaj kaj polaj kleruloj — historiistoj, geografoj, instruistoj, verkistoj de lernolibroj — jam dufoje kunsidis ĉijare kun la celo ekzameni la librojn pri historio kaj geografio, kiujn oni uzas en la lernejoj de la landoj kaj sugesti pli objektivajn kaj ĝustajn prezentadojn de rilatoj inter Polujo kaj Germanujo.

RAJTO AL EDUKO UNIVERSITATA

Ci tiun temon oni pritraktis dum la 25a kunsido de la konstanta konferenco de rektoroj kaj vickancelieroj

de eŭropaj universitatoj (CRE), kiu okazis en Beogrado, Jugoslavio, la 16an kaj 17an de novembro 1972. La diskutoj pritraktis precipe la rajton al eduko universitata de plenkreskuloj jam laborantaj, de virinoj, de malplimulto lingvaj kaj rasaj, k. t. p.

La CRE, kies celo estas kuragi kunlaboron inter universitatoj, kaj kies sidejo estas en Genevo grupigas jam 210 universitatojn.

(Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)

HELSINGÖR

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos denove en 1973 (22—29 de julio) en La Internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj pasigi neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Programo estas senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9

DK-8230 Åbyhøj, Danlando

Lasta dato por manuskripto por la sekvonta numero de La Espero: 1-a de majo 1973!

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

Korespondado

Geknaboj 13—14 jaraj. Skribu al la instruisto: L. Schödl, Rosa-Luxemburg-Str. 37, 195 Neuruppin, Germana Demokratia Respubliko.

Por si mem kaj por siaj belaj klubaninoj: E-instruisto D. Kolkev, S-Kolecevaĵa 20-149, 330058 Zaporozje, Sovet-Unio.

18-jara knabo, komencanto, kun svedaj gejunuloj pri i. a. politiko kaj esperanto: Wolfgang Bohr, Michel Reineke Strasse 8, D-5568 Daun-Eifel, Germana Federacia Respubliko.

HINDO EN SVEDUJO

La hinda junulo Animesh Sinha, kiu dum tri monatoj studis la paperfardan ĉe SCA-fabriko en Vivstavarv, translokiĝis kiam lia okupo finiĝis tie al Hallstavik. La modesta junulo estis tre ŝatata gasto ĉe pluraj kunvenoj de Amika Rondo dum la aŭtuno. Kiam finiĝis la studtempo en Sundsvall li serĉis novan okupon je samspeca fabriko kaj elektis el du eblaj, ĉar li volas lerni "por esti utila al sia lando".

Dum sia restado en Sundsvall li ricevis plurajn salutkartojn de svedaj amikoj al lia patro Lakshmiswar Sinha kaj tio ĝojigis la filon videble. Mi donas ĉi sube la nunan adreson de A. S., ĉar estas mia deziro ke li havu kontakton kun samideanoj dum sia restado en nia lando.

Do, Animesh Sinha, Hallsta Pappersbruk, 763 00 Hallstavik.

T. F.

Kurs-deltagare

När vinterns studieträffar är slut bevarar du dina kunskaper bäst genom att läsa esperanto.

Välj ur vår boklista i nr 6/1972, t. ex.:

KREDO FLOROJ DINAMITO

Biografier om den heliga Birgitta, blomsterkungen Linné och Nobel.

Inb. 10 kr, häftad 7: 50 + moms.

Vi skaffar dessutom gärna vad som helst som finns upptaget i UEA:s stora boklista i årsboken, del II.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7.

Postgiro 578-5

Stipendium

Halmstads Esperantoklubb ställer 500: — kronor till förfogande för ungdomar, som under 1973 deltagit i något esperantoarrangemang i Sverige eller utomlands.

Ansökan senast den 1 maj till HALMSTADS ESPERANTOKLUBB Norra vägen 11, 302 31 Halmstad

Förbundsstyrelsen

I förra numrets fullständiga förteckning över styrelsens ledamöter hade ett par beklagliga fel insmugit sig betr. Bertil Akerbergs adress och telefonnummer. Så här skall det vara: Bertil Akerberg, Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten, 08/46 29 95.

I övrigt upprepar vi här endast två adresser:

Jan Ströme, ordf., Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö, 040/12 92 11.

Ulla Luin, sekr., Myggdalsvägen 123, 135 00 Tyresö, 08/712 82 91.

FÖRLAGSFÖRENINGEN

ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkred 10.00—11.00
jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Ströme
Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom



Ny lärobok.
Till hösten.
Beställ idag
till förmånspris.

20 kronor per exemplar.

Beställ hos Svenska Esperanto-Förbundet
Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm
Postgiro 66 41 50-0 (SEF Informationskonto)

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,
Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm.
Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Redaktör: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-235 26 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 20 kr.

Förbundets sekretariat är öppet
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-62 58 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1973